



# PENSEO

*N-ro 378*

*apr. / 2023*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Tiberio Madonna (Italio)



### Tra la stratoj de vi

Kie via koro loĝas  
tie  
mia fantazio  
konstruos sian domon  
per brikoj el gumo  
por ne senti doloron  
kiam la pezo de viaj silentoj  
premegos ĝin  
kontraŭ la kvar muroj starigitaj;  
kaj sen tegmento  
por ke la ruĝa domo  
ne iĝu nigra prizono:  
tie  
mia fantazio  
estos libera  
forflugi supren  
kaj poste malsupreniros  
denove  
kaj denove  
altirata funden  
de la surfo onda  
de via sango.  
Kaj mi restos kontemplanta  
tra la fenestro  
dum horoj  
rigardante eksteren  
la lazuran maron  
de viaj okuloj  
ondan  
impetan  
kiu dronigas miajn sonĝojn  
kaj sensoifigas ilin

kaj farbas ilin  
ĉirkaŭigante min  
per la brilaj koloroj  
de siaj koraloj.  
Kaj dum tiu tempo  
dum tiu silenta kontemplado  
mia fantazio  
forflugos libera  
girante ĉirkaŭe  
per flugiloj de papilio.  
Ĝiaj malpezegaj  
nepalpeblaj flugiloj  
koloritaj de la koraloj  
ne tedos vin  
kiam ili pasos antaŭ viaj okuloj  
ĉar ilia ombro griza  
estos tiom maldika  
ke ĝi estos triste nevidebla  
envolvita  
kaj neniigita  
de la senlima suno lumega  
de via orgojlo  
kiu blindigos viajn okulojn  
kaj bruligos vian kompaton.  
Dume  
ĉiam  
ĉie  
mi restos  
en la sama loko  
en la sama tempo  
de nia renkonto  
kaj mi marŝos obstine  
tra la stratoj de vi  
mi vagos senutile  
tra la ĉambroj vastaj  
kaj malplenaj  
de via grandeco

dum viaj vortoj  
 resonantaj  
 sinkontraŭdirantaj  
 ĵetos min violente  
 sur la plankon  
 de la realo  
 nereala.  
 Kaj la realeco  
 de viaj kontraŭdiroj  
 nutros konstante eterne la eternan fajron  
 la etan flamon  
 tremetantan  
 kiu incendias mian universon.

## Moissey Bronshteyn (Rusio)



Mezo de marto. Dek ok sub nulo.  
 Daŭras la vivo, daŭre envintra.  
 Sparkas laŭ neĝo la respiegulo  
 de sunradioj. Estis revinta  
 mi pri la marta varmo modera.  
 Ve, realiĝi ne hastas la revo.  
 Tegras la teron tavolo sukera  
 kaj ne degelas eĉ post sunlevo.  
 Do tra l' neĝego trotu obstine  
 mi, ekzilito de l' frost' primavera,  
 kaj daŭre vartu la revon, ke fine  
 io ŝanĝiĝos post veno somera.

\*\* \*\*

Mi volus vivi eterne,  
 mi volus vivi enkarne,  
 sed mia amata ter' ne  
 konsentos pri tio, ĉar ne  
 eternas fajro kaj planto,  
 nubeto, rivero, monto,  
 eĉ malpli eternas lando,  
 kaj iom pli — nia mondo.  
 Sed havas ja mi, mortala,  
 esencan privilegion —  
 paroli kaj kanti al la  
 homaro, kaj diri ĉion  
 pri beloj de l' tag' kuranta,

pri ĝuoj de l' nokt' enigma  
 dum la vivolongo kanta  
 kun tuta sincer' anima.  
 En horo, ne tute klara,  
 mi spiri por ĉiam ĉesos,  
 sed kelkajn kantetojn, kara,  
 almenaŭ vi ne forgesos.  
 Vi ilin flustretu lante  
 al freŝa printempa grundo.  
 Reeĥos ili leŭkante,  
 cejane, konvale — nun do  
 mi reenkarne flore,  
 per mia petal' vin kisos,  
 karesos ame, amore,  
 kaj, eble, ni ne plu disos.  
 Kaj spiros venteto lante,  
 kaj flustros florkampo sterne,  
 ke, se ni ekzistis kante,  
 ni, certe, vivos eterne.



24.10.2010

\*\* \*\*

Mi revenas al miaj neĝoj,  
 al la fola frostet' februara.  
 Mi revenas al miaj seĝoj —  
 la ofica kaj hejma — pli kara.

Mi revenas al miaj reĝoj,  
 konsekvence perdantaj saĝon.  
 Mi revenas al miaj leĝoj,  
 kiuj ne toleras kuraĝon.

Mi revenas al miaj eĝoj,  
 kiujn mi piedas sen laco.  
 Mi revenas al miaj preĝoj  
 pri la paco.

\*\* \*\*

Tie, kie oni eĉ vivajn ostrojn konsumas,  
 neglektante tristan plenvean jelpon ilian,  
 tie, kie konkvoj en akvo perle relumas  
 eĉ sen perloj naturaj, troveblaj pli en  
 maroj de l'Oriento fora,

kaj tie, kie  
inter algoj rampas aroj da salikokoj sataj,  
tie mi malĉeestas.

Nun do nur  
nostalgie  
mi rememoras, ke iam estis de mi frandataj  
ĉiuj ĉi marestaĵoj senkulpaj, tamen bongustaj

—  
legu ĉi tion, mi petas, neniun naturprotektanto

—  
dank' al konsumo ĝuinda alvenis ja vortoj  
ĝustaj  
en la animon por renaskiĝi en ama kanto.

\*\* \*\*

Peniga pluvet' en la kort' –  
ploreto senĉesa...  
Mi tristas, ĉar vi estas for,  
tuŝeto karesa  
ne baldaŭ atingos ja min,  
nek kiso adstringa,  
ja restis en fora pasint'  
la bunto siringa...

Verŝajne pro arda bezon'  
mi revojn eklulas,  
kaj vi reaperas en songĝ',  
kaj meĉo forbrulas...  
Mi fermas okulojn kun mir',  
aspekte plej lica,  
ja se vi nun pensas pri mi,  
mi estas feliĉa.

## Ángel Arquillos (Hispanio)



### La petaloj

La petaloj de la rozo  
deŝiritaj pro la vento  
faladas sur vian kapon,  
dum la bruoj de l' silento  
vekas min, kia bedaŭro!  
Mi pluiras tutan tempon,  
mian senfinan vojaĝon  
kaj ploradas kun timtremo

sub la lumo de la ĉambro  
kiu ne havas tegmenton.  
Mi tenas grandan flor-faskon  
da lekantoj kaj jasmenoj  
por disŝiri la petalojn  
kaj fari floran mantelon  
kudrita de vera amo.

## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Vekiĝas la natur' denove  
Teneraj farboj de printemp' aperas,  
Ni planas kaj decidas ion,  
Feliĉon plani nur ne eblas.

La birdoj pepas, arboj reviviĝas,  
Anim' silentas, ĉarma kanto sonas,  
En ĉio estas la esper', miraklo,  
Domaĝe, la feliĉon plani ni ne povas.

P.S. Ne gravas kiam, sed feliĉo venos  
Similos al la floro, aŭ rideto,  
Degelos la sopiro, kiel neĝo,  
Aperos en la homoj bonaj, belaj sentoj!

## Klaus Friese (Germanio)



### Preskoboldo

Aŭtoro komencis editi,  
forĝesis profunde mediti.  
Li serĉis titolon,  
forĝesis kontrolon,  
kaj poste li povis nur ŝviti.

Aŭtoro daŭrigis laboron,  
sed baldaŭ li sentis angoron.  
La tekst' estis preta,  
ĝi estis kompleta,  
sed grumblis la saĝa lektoro.

Stultaĵo, aĉaĵo, eraro!

Vi fuŝis ja nur sen komparo!  
 La vort' estu pugno!  
 Sed vi skribis 'pugo'!  
 Eĉ ridas la dromedaro.

## RidATAKOJ

La doktoro Frenezulo  
 zorgas ne nur pri pustulo.  
 Ĝuas li grandan prestiĝon.  
 Do, esperu resaniĝon.

Benjamin havas problemon.  
 Ofte li eligas ĝemon,  
 ĉar li daŭre devas ridi.  
 Tiam li ne povas vidi,

ĉar pro rido fluas larmoj.  
 Kontraŭ ĝi ne estas armoj.  
 Venas li al kuracisto,  
 ĉar li estas optimisto.

Helpu min kara doktoro!  
 Multaj ridoj sen humoro.  
 Mi suferas pro torturo.  
 Helpu per akupunkturo.

Mia kara Benjaminino.  
 Nek la pinglo nek morfino  
 helpus kontraŭ la torturo.  
 Helpas nur mia fakturo.

Post rigardo al kalkulo  
 malaperos rid-stimulo.  
 Tre efika la kuraco.  
 Dankon jam pro la donaco.

## Wally du Temple (Kanado)



### Amkulero, ĉizita el ligno

( tradicio de Kimrio )

Ĉu vi amas arbojn?  
 Se jes, arbo alportos  
 Amon al vi per  
 romantika AMKULERO

Ĉizita el ligno  
 kun simboloj de  
 amkvalitoj kaj intencoj de  
 svatanto.  
 Tial, sopiranta amanto  
 vi pensu pri arbo,  
 el la multaj, kiujn vi amas  
 de koloroj, teksturoj kaj aromoj  
 de tiuj laŭdataj de poetoj,  
 La arbo de vivo,  
 la arbo de saĝo  
 la arbo de scio  
 la arbo de amo  
 de libereco kaj eterneco,  
 sed plejparte de la sezonoj  
 printempo, somero, aŭtuno kaj vintro.  
 Memoru ties amdonacon  
 de ombro, de ŝirmejo, de frukto  
 de ligno por totemoj indiĝenaj  
 por skulptaĵoj de famuloj — tuŝŝtonoj,  
 gardostarantoj, savgigantoj,  
 parencaro kaj memoro.  
 De grundaj biomoj per fungaj radikaj retoj  
 ili kreas kanopeojn por nestado de birdoj.  
 ili nutras multajn estaĵojn.  
 ili manĝas karbondioksidon el la atmosfero  
 transformante ĝin en branĉojn, radikojn,  
 trunkojn—  
 resanigantoj de la planedo  
 ekosistemgardistoj  
 donante oksigenon, stabiligante grundon,  
 produktante akvociklon  
 Vi fotu ilin.  
 Vi pentru ilin.  
 Vi parolu kun ili  
 Vi laŭdu ilin  
 Vi plantu ilin  
 Vi brakumu ilin  
 Tiam certe alvenos  
 amo de svatanto  
 Ligna amkulero  
 kun amkuleraj simboloj—  
 ĉizita hufumo por bonŝanco,  
 kruco por kredo

sonoriloj por geedziĝo,  
koroj por amo,  
radoj por subteno,  
seruroj por sekureco  
ankroj por hejmo  
pilkoj por kvanto da bedoj—  
Amkulero!

## Yohanes Manhitu (Indonezio)



### Insulo Timoro

"La montoj estas tre kovritaj de santal-arboj,  
ke oni hakas ĝin por brulligno, kaj ĝia forta  
odoro kelkfoje malsanigas homojn."

(Tung Hsi Yang K'au, 1618)

Insulo Timoro, insulo bela.  
Tre fama estas via nomo  
kiel santal-aromo tra insulo.

Estas menciita via nomo  
de generacio al generacio,  
de vilaĝoj ĝis urboj,  
de montoj ĝis marbordoj.  
Kiu ne scias vian nomon?

Dum sunleviĝo, vi brilas  
kiel arĝento brilanta,  
kaj kiam la suno subiras,  
vi flaviĝas kiel oro brilanta.

Homoj de oriento, de okcidento,  
de la suda sfero  
ĝis la norda flanko  
scias kiu vi estas.

Insulo Timoro, vi estas patrino  
por ĉiuj viaj geposteuloj.  
Preĝu por ke viaj geidoj  
vojaĝu tra la mondo  
kaj poste revenu  
por laŭdegi vian nomon!  
Ho Insulo Timoro, insulo bela,  
insulo aroma.

## Poeto

(Al poetoj verkantaj en la davana)  
Vortoj estas sia manĝo bongustega;  
lingva senco estas sia trinkaĵo dolĉa.  
Li daŭre verkas el sia kora profundeco,  
kaj disjetas vortojn al koroj kaj animoj.

Iu dirus ke li sonĝas aŭ frenezas,  
aliaj dirus ke li vere ne ŝatas labori.  
Sed li estas vera verkisto, bona gvidisto  
al ili: laŭdantoj de skribaĵo kaj vortoj.

Ho poeto, elkora vortsendanto;  
laŭsenta konsilanto kaj gvidanto.  
Via riĉaĵo estas belsona poezio legita,  
viaj kunuloj estas vortoj kaj skribilo  
ponta.

## La vento

Mallaŭta, plena de tenero;  
Kruela, plena de furiozo.  
Vi envolvas la teron.  
La dian liberecon,  
La povon de l' mondo  
Vi havas sen esti almozulo.

Centra Javo, 3an de januaro 2023

## Jadranka Miric (Serbio)



### Al Vinna festotago — la 8a de Marto

Estis griza pluva tago.  
Aŭdiĝis malnova kanto .  
Fingroj tuj frapetis laŭritme.  
Lipoj sekvis flustre en Esperanto.

Sur la brusto verda stel'  
Drinkis ni vinon el malnova kel'.  
Adiaŭa amuza festo  
pli fortis muziko ol ekstera tempesto!.

“Kiam feliĉas ni”  
kantis gaje mi.  
Koro nia rompiĝis  
noktomeze ni amike disiĝis.

## Patrino

Unika, amata,  
fraŭlino, edzino.

Patrino  
mia kaj la via,  
nia kaj la via!

Patrino  
kara, zorgema,  
tenera kaj laborema,  
Patrino  
kaj edzino kaj amatino,  
kaj bopatrino, kaj onklino kaj avinjo.

Patrino  
Stanka, Svetlana, Marta, Lena kaj Ĵana,  
La edzino de Sveto, Petro, Milano aŭ Joĉjo.  
Iam, nun kaj porĉiam!  
Patrino  
neanstataŭebla

pro sia spirito giganta ,  
pro sia kredo ĉionpova.  
Patrino  
ĉiam estis kaj poreterne estu!  
Unuvorte Patrino, panjo kara !

## Martaj sunradioj

Suno varmigas branĉaron.  
En ĝi ĉirpas kaŝitaj birdoj .  
La granda branĉaro ŝetas ombron  
en kies ombro ĝuas tri fraŭlinoj.

Vide al vide sidas tri fraŭloj.  
Ili sidas kviete okule akompanante

fojfoje la flugilojn de papilio aŭ fraŭlinojn  
observante silente .  
Eĉ malĉeestas enuaj kuloj.!

La belaj fraŭlinoj ridetis sekrete  
dum ĉarmaj junuloj rigardis ilin atente.  
Kiu faros la unan paŝon?  
Eble iu el novaj pasantoj  
aŭ ili disiĝos kiel hazardaj naturoamantoj?

## Ivanichka Magharova (Bulgario)



Pluvanta printemp’ .  
Sub la tegmento sole  
najtingal’ frostas.

Mi sidis sur sojl’  
de la orfiĝa domo,  
kun panj’ parolas.

Gutoj fluas  
sur l’ fenestro malgaja.  
Arane’ gvatas.

En la malvarma  
nokto kameno frostas.  
Amo foriras.

Najtingala kant’  
en la branĉoj de l’ pino.  
Kato aŭskultas.

Sur branĉet’ de roz’  
arbusta alaŭd’ ĝemas.  
Dorno en kruret’.

Ĉasu la vento  
en Paradiza Ĝarden’  
pekeman Eva-n

\*\*\*

L’ aŭtun’ pluvetas.  
Birdoj brue kantas.  
Konfitaĵoj el figoj

Amantaj triloj —  
 en branĉoj brava paser’.  
 Falanta nesto.

Arbo soleca—  
 ido de la naturo.  
 Migrulo laca.

Ho...! Papilio  
 tuŝetis mian brakon.  
 Teneriĝema.

Manplatoj tremas.  
 La ŝtono ekparolis.  
 Ĝemo en silent’.

Viaj ĉemizoj  
 ŝipa velo ĝi estas.  
 Ŝipo ĉe l’ kajo.

Glaskoj malplenaj.  
 La vortoj jam diritaj.  
 Prujno sur glaskoj.

Frostiĝinta paser’  
 sur la fgenestro frapas.  
 Ĵetita paner’.

## Elena Popova (Bulgario)



## Marta ĝojo

Marto sur vento  
 alvenis Printempo  
 post longa vojo.  
 Kuradis, rigardis,  
 sen kaŝi sian ĝojon.  
 Pri kio ĝi miris?  
 Galant’ kapon klinas  
 kaj al io sopiras.  
 Flavan krokuson  
 jen la suno kisas.  
 Bunta primolo  
 brilas libervole.

Ĝojigis la koron  
 al Marto la floroj.

## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



## Nia verda stelo

La verda stelo  
 flagrante altleviĝas  
 kun glora helo.

Por idealo  
 la sama, ni ĥorkantas  
 laŭ madrigalo.

Kun bondeziro  
 la mondpopolon benas  
 ni el aspiro.

## Sopiro ĝis herbaro verdas

Blankaj nuboj en la blua firmamento  
 flosas kun la vento.  
 Ĉevaloj galopas sur stepo fervora  
 rekte al distanco fora.

Ho karulo, mia amo granda,  
 ĉu ankoraŭ vi memoras min?  
 Balado eĥas sub la suno subiranta,  
 ĉu vi povas aŭdi ĝin?

Sopiro ĝis herbaro verde prosperas,  
 mia koro estas jam ebria.  
 Mi sopiras vin ĝis nuboj malaperas,  
 tuj revenu al mi, kara mia!

La anksia atendanta sufero  
 estos fandiĝinta per la primavero.  
 En viaj brakoj kun tenera kiso  
 jam troviĝos mia paradizo!

## Vespersuno ruĝa

Vespersuno ruĝa la plej belas brile  
 tiel dolĉe kaj trankvile.  
 Ĝi similas al malfrua floro

kaj multjara vino de valoro.

Ĝi 'stas tarda la amanta emocio  
kaj ne—plenumita la pasio.  
Tiom amo kaj pasio plenadora  
jen fariĝas la sunlumo ruĝkolora.

## Rendevuo en junto

Jen leviĝas monatmeza luno plena,  
sennube soleca, ĉielo serena.  
La belan knabinon atendas mi,  
sed kial ankoraŭ ne alvenas vi?

Se oni ne pluvakvon de ĉielo trovas,  
begonio ne si mem ekflori povas.  
Se nur vi atendas pacience ho amata,  
tuj alkuras via kara el pasejo glata.

## Paradizo

Tiel blua estas la ĉielo,  
lagoakvo klaras kun purhelo.  
La herbejo verdas jam fervore,  
jen mia hejmo kara glore.

Ĉevaloj galopas al foro,  
ŝafaro migradas en blanka koloro.  
Amata knabino bel—ardas tenera,  
tio estas mia hejmo ja prospera.

Mi amas vin, ho hejmo mia,  
vi 'stas paradizo harmonia.  
Mi sopiras vin, ho hejmo mia,  
vi 'stas paradizo idilia!

## El Ĉina Antikva Poezio

Chen Liang (1143-1194)

—laŭ melodio *Tufo da floroj*

La brila lun' oblikve moviĝetas,  
river-rubando glimas fride.

Ebrie mi ĉe l' balustrado staras,  
alfrontas la pejzaĝon fiksevide.  
Tra fum-nebul' mi aŭdas  
ke ie la fiŝistoj frapas ja ekscite  
je l' boatflanko por paniki fiŝojn  
kaj kapti ilin tuj per reto rapide.  
Monedoj lacaj dormas en la nesto,  
navede naĝas fiŝoj glite,  
oblikve pendas steloj  
jen super salikarboj hel-livide.

Fragmitoj etendiĝas vaste,  
ondetas riverakvo en nebulvapor—  
aŭtunpejzaĝo regas ĉie trae.  
Mi kvaz' sin trovas en songĝ-horo,  
kaj ŝajne mi promenas ĉe la bordo  
en sudo plena de riveroj sub sungloro.  
Aŭtuna vento kun kristalaj rosoj  
ekblovas furioze kun frivolo.  
De antikvec' ĝis nun, laŭ konsidero mia,  
la luno triste lumas ĉiam sen konsolo.

Zhang Liangneng (?-1214)

—laŭ melodio *Malgranda montvico*

Malhele verdas salikarboj,  
kaj okulplaĉas floroj hele.  
Jam ruĝaj peonioj ekburĝonos  
post heĝ' per brilo jada bele.  
Pluvet' jam ĉesis verŝi gutojn  
kaj mola vento blovas enaere,  
de temp' al temp' aŭdiĝas birda pepo.  
La tago pli kaj pli longiĝas vere  
sed la restanta frido de printempo  
ankoraŭ vagas ja leĝere.

Ne dronu en paseoj kun ĉagreno.  
Profite de vetero bona kaj favora  
kaj senokupa kaj libera tempo,  
ekskursu ja kun sento bonhumora  
aŭ iru supren al altaĵoj.  
La lokoj en la bild' memora  
ankoraŭ restas samaj kiel iam  
sed jam perdiĝis mia jun' trezora,  
kaj mi ne povas ĝin retrovi



el la pasinta temp' tre fora.  
*elĉinigis*



**Vejdo (Ĉinio)**

\*\*\*\*\*

**Lu Meipo (?—?)**

*Neĝofloko kaj umejloro*

1.

Ambaŭ por pejzaĝ' printempa estas  
favoratoj,  
bardo ĉagreniĝas: Kiu el du pli valoras?  
Umejloro malpli blankas, jes, ol  
neĝofloko,  
tamen ol ĝi, la rivalo, ja pli bonodoras.

2.

Sen neĝo umejloro sin trovas senanima;  
vulgara iĝas neĝo sen strofo bele rima.  
Vespere versoj venas kaj ree flokoj falas:  
el ili nun naskiĝas printempo ja subluma.

**Jie Xisi (1274 — 1344)**

*Priskizi anasidojn*

Etaj herboj etendiĝas dense,  
anasidoj kreskas grandiĝantaj.  
Kun lanugaj plumoj elegantaj  
ili gakas, gakas, kri—intense.

*Frosta nokto*

En sporadaj steloj prujno fridas,  
arboj sub flosanta lun' humidas.  
Mi sendormas en gastej' silenta,  
kaj nun falas folio turmenta.

**Wang Mian (1310 — 1359)**

*Umejloroj tuĉpentritaj*

Staras la ume' ĉe la baseno inkuj-lava,  
ĉiu floro malfermiĝas pale tuĉpentrita.

Ili ne bezonas laŭdon pri l' koloro rava,  
jam sufiĉas en l' aero bonodor' invita.

**Yang Shen (1488 — 1559)**

*Kampara ekskurso*

La terasokampoj ŝtupare leviĝas,  
dum plataj rizejoj ŝajnas ŝaktabuloj.  
Ardeoj subite alflugas kaj punktas  
la verdon rizkampan per blankaj makuloj.

*Elĉinigis*



**Minosun (Ĉinio)**

\*\*\*\*



**Zhuangzi**

**ĈAPITRO DUTRIDEK—DUA**

**Liezi**

§32—03

Zhu Pingman elspezis sian tutan familian posedajon por lerni de Zhili Yi la lertecon pri mortigo de drakoj. Post tri jaroj li akiris la lertecon, sed li trovis nenian okazon por praktiki sian lertecon.

§32—04

La saĝulo konsideras nenecesa tion, kio estas necesa; jen kial ekzistas por li nenia disputo. La ordinarulo rigardas necesa tion, kio estas nenecesa; jen kial ekzistas por li senfinaj disputoj. Homoj disputas, ĉar ĉiu el iliaj agoj estas trapenetrita per la avido je la profito kaj la famo. La senĉesaj disputoj finfine kondukos al mempereo.

La vulgarejoj elspezas multe da tempo kaj energio sur bagatelaj aferoj kaj sur siaj inteligentaj agadoj ktp. Ili intencas savi ĉiujn estaĵojn en la mondo pensante, ke tiel agante ili povus reveni al la praĥaosa stato de la mondo kaj sekve atingi la perfektan harmonion kun la universo. Tiuj homoj,

obsedataj de la vasteco de la universo kaj fizike elĉerpitaj, ne vere komprenas la esencon de la praĥaoso. La perfekta homo tamen volas lasi al sia spirito reveni al la praĥaosa stato de la mondo kaj amas dormi en la lando de nenieco. Li estas kiel fluo de akvo, kiu kuras de nenie al la natura kvieteco.

La vulgaraj homoj elspezas multe da tempo kaj energio sur bagatelaj aferoj kaj neniam penas kompreni la grandan pacon. Ho, kia domaĝo!

### §32—05

En la regno Song vivis iu homo nomata Cao Shang, kiu iam estis sendita de la reĝo kun speciala komisiono al la regno Qin. Antaŭ sia foriro li ricevis de la reĝo kelkajn ĉarojn. Plenumante sian komisionon en Qin, li plaĉis al la reĝo de tiu regno, kaj tiu donacis al li ankoraŭ 100 ĉarojn. Reveninte al sia regno, Cao Shang diris al Zhuangzi:

“Loĝante en treege izolita kaj mallarĝa strateto, vi estas tiel malriĉa, ke vi devas plekti pajlajn sandalojn por via vivteno. Vi estas tre pala kaj malgrasa. Tio estus por mi neeltenebla. Ĉi—rilate mi estas malsupera al vi. Sed renkontiĝinte kun la potenca reĝo nur unu fojon, mi jam faris min la posedanto de cent ĉaroj. Ĉi—rilate mi ja estas supera al vi!”

“Mi aŭdis,” diris Zhuangzi, “ke la reĝo de la regno Qin iam estis en malsano kaj bezonis kuracadon. Al la kirurgo, kiu entrancis al li absceson aŭ furunkon, li donis unu ĉaron; al tiu, kiu kuracis lin de liaj hemoroidoj per lekado, li donis kvin ĉarojn. Ju pli malnobla estas la kuracrimedo, des pli da ĉaroj la kuracanto povis ricevi. Mi supozas, ke ankaŭ vi lekadis al li la hemoroidojn. Alie, kiel do vi povis ricevi tiom da ĉaroj? Nu, bonvole foriru de mi!”



Elĉinigis



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

# Ĉineske

**Yi Qiao (ĉino en Germanio)**

## Profunda maro

— laŭ ĉinesko *Budhista dancisto*\*

Lazuras belaj revoj,  
desupre ŝvebas mevoj.  
Jen profunda mar'  
bluondas sen bar'.

Ĝi muĝe brilas,  
por ben' jubilas.  
En la sankta am'  
beatas ni jam.

\**Budhista dancisto (ĉine: Pusaman): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo*

## Primavero en kor'

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu*\*

Ĉielo lumas hele,  
kamparo bele.  
Laŭ bordo de verda lag'  
vagadas ni en serena tag'.

Lirlantas klare roĝo  
en paca ĝojo.  
Ni flustras kun bonhumor',  
la primavero reste en kor'.

\**Belulino Yu (ĉine: Yumeiren) ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.*

**Jadranka Miric (Serbio)**

## Espero laste mortas

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Ankoraŭ  
vintras. Odro

de neĝostormo pinĉas  
nazon. Tremblanta koro  
je ĝusta horo.

Finfine  
blankiĝis ĉio.  
Abundas neĝa tavolo.  
Urga situacio.  
Fi-tragedio.

Avino  
Marta frapas sur  
la pordo. Ekis sporta  
tradicia aventur' .  
Grafitoj sur mur'.

En vivo  
reala, neni'  
bonas. Homoj militas.  
Malamo kreskas. Ĉi fi  
uloj pretas ridi.

Malgraŭ ĉi  
militemuloj  
ekkreskis konscio pri  
granda bezono helpi  
ĉi mondon savi!

## Azia Lumoturo

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Ŝanĝiĝas  
la mondon ne nur  
klimate sed ankaŭ tra  
ekonomia konkur'  
milit' aventur'.

Neniam  
mondo troviĝis  
pli proksime al milit'  
estonta. Freneziĝis  
ĉiuj. Disiĝis

dolore  
multaj. Altiĝis

malamo. Aperis fi  
homoj . Ĉasantoj iĝis.  
Mond' malcertiĝis.

Pluvegis  
ĉie. Ektremis ie  
tero! Klimato ŝanĝis  
la viv' kondiĉojn. Pie  
ni preĝantaj. Ve..

Lumturo  
donas esperon,  
stiras kuraĝen, paŝas  
senhalte nur antaŭen!  
en ĉiu direkton!

*\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

## Laimundas (Litovio)



Ĉu vivo estas bela?

Iun tagon mi sidis kun amiko, mi nomu lin Paŭlo, en kuirejo kaj trinkis bieron. Ni rakontis anekdotojn kaj nia interparolo temis pri ĉiutagaj viraj aferoj, nome—la politiko kaj virinoj. Poste ni interligis nin per manoj kaj dance kuris el kuirejo al gastoĉambro, de tie ni dancis ĝis dormoĉambro. Ni eĉ ne rimarkis, kiam revenis mia edzino Oksana.

—Tre agrablas, kiam ni estas kune, —ĝojkriis ŝi.

—Ĉu agrablas?, —mi gratis okcipiton. —Al mi ŝajnas, ke mankas biero. Iu devas senti respondecon. Iru vi por aĉeti bieron, — diris mi al edzino.

—Sufiĉas la biero. Mi jam iros, — diris Paŭlo, adiaŭis kaj forlasis nian loĝejon.

Mi pri ĉio scivolas kaj mi volas demandi mian edzinon. Nur kiel ĉiam, mi embarasiĝas, ruĝiĝas kaj ne trovas taŭgajn vortojn. Pri mi mia edzino diras: „mia gapulo“. Mi koleras kaj kontraŭdiras. Mi estis gapulo delonge. Mi estis gapulo tiam, kiam mi ankoraŭ ne konis mian estontan edzinon. Ĉu mi konatiĝus kun ŝi, edzinigus ŝin kaj vivus kun ŝi? Mi

dubas. Ŝi ekbalbutis ion, ŝajne „stultulo“.

—Ne kuraĝu paroli kun mi tiel! — diris mi.

Mia Oksana estas bona dommastrino, ne kverelema kaj ne grumblulino. En nia hejmo estas ĉio en ordo kaj pura. Ŝi estas ordema virino. Tamen min maltrankviligas kelkaj lastaj eventoj. Foje, tio okazis antaŭ unu jaro, mi revenis hejmen post la kluba jarkunveno kaj ekstaris ĉe la loĝeja pordo. La nova porda seruro ne subiĝis, almenaŭ hurlu ĉe la pordo.

—Atendu iomete, — kriis Oksana aliflanke de la pordo. — Seruro difektiĝis, pro tio mi invitis Paŭlon. Li tuj riparos la seruron kaj malfermos pordon.

Kaj vere... Eble post kvin minutoj la seruro ekkrakis kaj pordo malfermiĝis. Mi ekvidis en la aperturo de pordo mian amikon kun la ŝraŭbturnilo enmane.

—Ĉio en ordo!, — diris li. —Nun seruro funkcios bone, vi ekvidos!

—Mi tre dankas, — diris mia edzino.

Paŭlo adiaŭis kaj foriris. Mi ĝojis, ke ĉio finiĝis bone. Mia edzino ĝojis eĉ pli.

Alian fojon, tio okazis antaŭ kelkaj monatoj, sabate mi revenis hejmen post BET — la tradicia esperantista renkontiĝo, kaj kisis mian edzinon, parolpovon perdintan pro la ĝojo. Kaj intencis mi iri en kuirejon. Tamen mia edzino detenis min kaj milde diris:

—Atendu iom... Tie laboras Paŭlo, kiun mi invitis por ripari fridujon. Li estas kolera... kaj avertis min, ke mi ne malhelpu lin.

Bone. Mi atendas. Post dek minutoj Paŭlo aperas kaj diras:

—Ĉio estas en ordo. Surtabligu vi botelon da brando. Estas kaŭzo por eldrinki. Nun fridujo funkcios bone.

Post kiam ni finis drinki botelon da brando, Paŭlo adiaŭis kaj foriris. Kiam ni restis hejme solaj, mi kontraŭdiris al mia edzino pro tio, ke ŝi ne atendis min.

—Mi ne povis atendi, — reiris Oksana, mia edzino. — Tiu aparato komencis tiel terure varmiĝi, ke ĝi nepre bezonis ripariston. Krome, —ŝi jam atakis min, —vi promesis reveni nur dimanĉe. Kaj

ĉiuj nutraĵoj, manĝaĵoj povis difektiĝi.

—Nu, vere! Ĉu pro la botelo da brando ni kverelu? Plej gravas — konkordo en la familio, amo, paco, — cedis mi.

Lastan fojon, tio okazis antaŭ monato, finfine mi ne sintenis kaj, post la foriro de Paŭlo, diris al Oksana:

—Hontu vi stari nur subveste kaj rigardi, kiel li riparas akvokranon. Vi mem vidas, kiel li laboras eĉ varmiĝinta, senvestiĝinta ĝisduone. Sed vi apude staraĉas, fi! Senhontulino! Vi povis almenaŭ sin vesti...

—Mi ne volis restigi lin sola en banĉambro, por ke li ne ŝtelu ion, — sinpravigis Oksana.

—Vi pravas, tamen ne decas apude staraĉi duonvestite, — ne cedis mi.

Vorto post vorto kaj ni interkverelis, mi diris, ke ŝi povis sin vesti almenaŭ per negliĝo. Tamen edzino komencis plori, krii, ke tiu negliĝo jam estas malmoda. Kaj mi promesis aĉeti novan negliĝon. Finfine ni interpaciĝis. Tamen, ekvidinte ŝin kun ŝus aĉetita negliĝo, mi iĝis des pli malpacienca, maltrankvila.

Pasintsemajne Oksana diris al mi:

—Vi estas tre enuiga, Mikaelo. Mi ege enuas kun vi.

Mi konfuziĝis kaj ekmalĝojis.

—Tamen vi scias, Oksana, ke mi..., — ekbalbutis mi. — Eĥ, ho ve..., — malĝoje mi svingis permane.

—Kaj Paŭlo estas tute alia. — diris ŝi, — Kiam li diras ion, oni povas morti pro la rido.

Mi mallevis kapon.

—Tiu Paŭlo estas tre brava, — parolis ŝi. —Li ĉion scipovas. Vi ne pensu, ke vi estas plej saĝa el ĉiuj.

Mi ĉion komprenis kaj pri nenio demandis. Mi leviĝis de sur la seĝo ofendiĝinta. Mi volis scii veron. Paŭlo estas mia amiko, sed la vero plej gravas. Ju pli longe mi pensis, des pli nervoziĝis mi.

Mi forpelis Paŭlon kaj ne plu volas vidi lin. La pordo de mia loĝejo por ĉiam estas fermita por li. Tion mi faris nur pro justeco, sed tute ne pro tio, ke li antaŭhierau ne pruntedonis al mi kvin eŭrojn. Mi havis bonan amikon, Paŭlon, kaj jam ne plu havas.

Disiris niaj vojoj. Spite ĉion tamen, kie esta la limo inter saĝaj homoj kaj malsaĝuloj? Dum kutime ĉio verdas, floras, tamen kion vidas mi?

Pridiskutinte tiujn ĉi aferojn, mi komprenis, ke mi ankaŭ kulpas. Se ne miaj forveturoj kaj mia inklino al Esperanto, vere mi povus pli ofte resti hejme kaj pli multe da tempo dediĉi al familio. Do kion mi faru? Ĉu mi ŝanĝu mian laboron? Eble mi forlasu Esperanton? Aŭ mi ŝanĝu mian loĝejon, kie ĉio difektiĝas? Mi petas, bonvolu konsili al mi.



## Venantas Butkus (1936—)\*



Kial ĉinoj ne malkovris Eŭropon?



Vere, kial? Ja jam ses mil jaroj antaŭ Kristo ili realigis revolucion sur la kampo de navigado. Eklevinte velojn en siaj ŝipoj, ĉinoj estis la unuaj en la tuta mondo ekuzintaj kompason, magnetigitan metalan nadlon, inventis pulvon kaj paperon, scipovis skribadon kaj legadon, kiam tiutempe sur Mezeŭropo kuradis analfabetaj barbaroj, armitaj per klaboroj.

Kompare al la feŭda Eŭropo, Ĉinio longdaŭre avangardis en mara navigado. Komence de la 15 jarcento tie estis konstruataj la plej bonaj ŝipoj en la tuta mondo. Grandega ĉina ŝiparo al kiu nenia alia egalas, brave fendadis Hindan Oceanon. Tiu minaca ŝiparo preskaŭ 30 jarojn estis estrata de admiralo Zheng He (1371 – 1435). Ĉi vojaĝisto, ŝiparestro kaj diplomato postrestis unu el la plej klaraj spuroj en la historio de la navigado en Ĉinio.

La politiko de la imperiestro Jongle de Ming

dinastio estis direktita al la disvastigo de internaciaj rilatoj kaj demonstrado de sia potenco. Tio bezonis grandan kaj fortan ŝiparon. Kiel indikiĝas en tiutempa kroniko laŭ la ordono de la imperiestro en la jaroj 1403 – 1407, estis konstruitaj 1681 ŝipoj taŭgaj por marvojaĝoj. En historiaj fontoj asertiĝas, ke la plej grandaj el ili atingis longecon de 120 metroj kaj larĝecon de 50 metroj. Ili estis nomataj „oraj“ aŭ „trezoraj“ grandŝipoj. Ili havis 9 mastojn kun veloj el ruĝa silko, ornamitaj per bildoj de mitologiaj animaloj. La ŝipoj kapacitis ĝis kelkcent armitaj soldatoj de la admirala gardistaro. Ambaŭborde sub la supra ferdeko viciĝis kelkdek kanonoj. Por admiraloj kaj oficiroj de pli malaltaj rangoj estis establita luksaj ejoj.

Ne pli malgrandaj estis ankaŭ la okmastaj, tiel nomataj – „ĉevalaj“ ŝipoj. Per ili estis transportataj la ĉevaloj de soldatoj, rezervoj de furaĝo kaj diversaj varoj intencitaj por vendi kaj donaci al la estroj de eksteraj landoj. Sesmastaj 77 metroj longaj kaj 35 metroj larĝaj ŝipoj estis dediĉitaj por transporti la nutraĵon de la ŝipanaro, kiu konsistis el greno, rizo, fiŝo, fermentitaj trinkaĵoj. La ŝiparo estis ĉiam akompanata de ŝipoj, celigitaj por transportado de akvo. La plej granda aro de ŝipoj konsistis el 60 – 50 metroj longaj velŝipoj transportintaj nur armeanojn.

Eŭropo tiam ne povis sin laŭdi nek pro tiom grandaj ŝipoj, nek pri tiom ampleksa ŝiparo. La fama „Santa Maria“ de Kristoforo Kolombo, per kiu li ekveturis malkovri novajn terojn, estis ne pli longa ol 25 metroj. En la Nevenkebla Armado, kiun por la lukto kun angloj en la jaro 1588 kolektis la hispana reĝo Felipe II, entute estis nur 130 grandaj velŝipoj.

Aŭtune de la jaro 1405 la ĉina imperiestro admiraligis sian sindonon subulon Zheng He en granda ŝiparo kaj devigis lin viziti Okcidentajn landojn kun diplomata misio. Laŭ postrestintaj analoj en la unua ekspedicio partoprenis 317 ŝipoj. Ili enhavis 70 eĥnuĥojn (ili estis personoj tre influaj, okupantaj altajn postenojn en la imperiestra kortego), 180 medicinistojn, 5 astrologojn, ĉirkaŭ 30 mil maristoj, soldatoj, diversfakaj metiistoj. Tio estis la plej granda maresplora ekspedicio dum la tuta historio. Ĝi daŭris du jarojn kaj dum ĉi tempo la ĉina

